# Aktivigaj taskoj pri primovadaj temoj

1. Titolo: Reklamo.
   Priskribo: Verko aŭ rakonto pri movada reklamo.

Tasko:

Faru kelkajn variantojn de reklamo (oficiala, serioza, multpromesa, gaja, amuza ktp) pri malfermo de nova Esperanto-kurso.

2. Titolo: Gazeto.
   Priskribo: Verko aŭ rakonto pri Esperanto-gazeto.

Tasko:

Faru planon de numero de kluba Esperanto-gazeto.

3. Titolo: Esperanto-Radio.
   Priskribo: Verko aŭ rakonto pri agado.

Tasko:

Verku por Pola Radio leteron kun rakonto pri interesa evento en la vivo de via klubo aŭ asocio de esperantistoj. Sendu ĝin kaj atendu aŭdigon de via informo.

4. Titolo: Internacia lingvo.
   Priskribo: Verko aŭ rakonto pri internaciligva problemo.

Tasko:

Laŭ vi, kial la mondo emas uzi nacian lingvon por interkomunikiĝi anstataŭ pli facila, pli neŭtrala lingvo kiel Esperanto? Ĉu plaĉus al vi, se la mondo uzus vian gepatran lingvon kiel la internacian lingvon?

5. Titolo: Mecenato.
   Priskribo: Verko aŭ rakonto pri Esperanto-fonduso.

Tasko:

Imagu, ke iu mecenato transdonis por la bono de Esperanto grandegan monsumon kaj nomumis vin administranto de tiu fonduso. Rakontu, kiel vi disponus pri tiu mono.

6. Titolo: Informado pri Esperanto.
   Priskribo: Verko aŭ rakonto pri aranĝo por estontaj esperantistoj.

Tasko:

Priskribu detale vesperon pri Esperanto antaŭ la komenco de nova Esperanto-kurso.

7. Titolo: Interna ideo.
Priskribo: Verko aŭ rakonto pri la Interna ideo.

Tasko:

Kion vi opinias pri la interna ideo de Esperanto?

8. Titolo: Aplikado de Esperanto.
Priskribo: Verko aŭ rakonto pri ebloj de aplikado de Esperanto.

Tasko:

Verku planon de laboro por pli ampleksa enkonduko de Esperanto en la vivon de la socio.

9. Titolo: Ekspozicio.
Priskribo: Verko aŭ rakonto pri ekspoziciaj materialoj.

Tasko:

Se vi farus grandan ekspozicion pri Esperanto, kion vi metus tien? Priskribu detale.

10. Titolo: Intervjuo.
Priskribo: Verko aŭ rakonto pri la stato kaj perspektivoj de Esperanto.

Tasko:

Imagu, ke vi prenas intervjuon de la Prezidanto de UEA por la plej populara nacilingva gazeto de via lando.

11. Titolo: Esperanto-Centro.
Priskribo: Verko aŭ rakonto pri eblaj servoj al esperantistoj.

Tasko:

Imagu, ke vi estas direktoro de granda, moderna Internacia Esperanto-Centro, kiu inkluzivas hotelon, lernejon, bibliotekon, restoraciojn kaj ĉiajn imageblajn priservejojn. Prezentu intervjuon, kiun vi donas al Esperanto-radio pri tiu Centro.

12. Titolo: Prezidanto.
Priskribo: Bonstila verko aŭ rakonto pri movadaj problemoj.

Tasko:

Imagu, ke en landa Esperanto-kongreso vi estas proponita kiel unu el la kandidatoj por la posteno de prezidanto de la landa Esperanto-asocio. Verku vian programan paroladon, kiu estu laŭeble ne nur profund-enhava, sed ankaŭ bonstila oratoraĵo, ornamita per trafaj stilaj figuroj.